

HEROLDO

Eldono : Flandra Esperanto-Instituto, P. v. Humbeekstraat 3, Brussel-West.
Redakcio-Administracio : T. Jung, Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Ned.
Jarabono : *Belgujo* 165 fl., *Nederlando* 9 gld. ; cetera laŭ aparta tarifo.
(Abonantoj por 1948 ricevas premie la numerojn de okt.-decembro 1947.)
Anoncoj : 25 komencitaj vortoj b. fl. 25.—, gld. 1.25 aŭ 6 resp.-kuponoj.

DE ESPERANTO

DUONMONATA INTERNACIA ORGANO DE LA ESPERANTO-MOVADO

N-ro 17 (1076)

FONDITA EN 1920 — 23-a JARKOLEKTO

15 Novembro 1947

UNO kaj la lingva problemo

Speciale verkita por « Heroldo de Esperanto »
de D-ro W. Solzbacher, New York.

Ĉu estas simbolo, ke la Sekretariejo de la Unuigitaj Nacioj (UNO) troviĝas ĉe « Lago Sukceso » (Lake Success) ? Aŭ ĉu la vera simboleco konsistas en la fakto, ke sur la Longa Insulo (Long Island) ĝi estas inter la urbo « Babilono » (Babylon) kaj la « Pordo al la Infero » (Hell Gate, malvasta parto de la markolo) ? Se tiu fakto kaŭzas tro grandan pesimismon aŭ mokan rimarkon, ke UNO jam estas survoje de Babilono al la alia loko supre nomita, optimisto povas respondi per alia geografia fakto same simbola : Lago Sukceso ankaŭ troviĝas inter Klarvido (Clearview) kaj Urbo de Amikeco (Amityville). Estante nek tro pesimista nek tro optimista, mi emas diri, ke la homaro kaj la Unuigitaj Nacioj ankorau havas la eblecon elekti, ĉu ili volas iri de Babilono al la Infero aŭ de Klarvido kaj Kompreno al Amikeco kaj Harmonio. En la nuna momento, bedaŭrinde, UNO ankoraŭ estas tro proksima al la babilona konfuzo de lingvoj kaj ideoj, en la laŭvorta kaj en la simbola senco de tiu konstato. La teknika plibonigo de la tradukmetodoj ne povas multe ŝanĝi tiun fakton.

Unuafoje la 22-an de septembro 1947, ĉeestante la Ĝeneralan Kunvenon de la Unuigitaj Nacioj en Flushing Meadow, mi observis, kiel funkcias la *novaj radio-tradukiloj*. Kiam mi eniris la salonegon, oficisto staranta ĉe la pordo donis al mi aparaton konsistantan el du partoj : duobla telefon-aŭskultilo, kiun oni metas sur la kapon, kvazaŭ ĝi estus kasko, kaj kiun oni alĝustigas sur la orelojn, kaj nigra brikforma elektra baterio, kiun oni portas per leda ŝnuro ĉirkaŭ la kolo aŭ la ŝultro. La baterio enhavas la radio-ricevilon, la leda ŝnuro la antenon. Je la supra parto de la baterio estas du butonoj turneblaj. Unu ebligas pli aŭ malpli laŭtan aŭskultadon, la alia povas esti turnata al sep malsamaj pozicioj kaj ebligas elekton de la lingvo, en kiu oni deziras aŭdi la paroladon. Teorie oni do povas uzi la sistemon por samtempa disaŭdigo de parolado en sep lingvoj, sur sep malsamaj ondlongoj. En la Ĝen. Kunveno oni tradukas nur en la anglan kaj francan lingvojn. Tamen multaj parolantoj uzas aliajn lingvojn, tiel ke la aparato ofte ebligas elekton inter tri lingvoj. La 22-an de septembro, ekzemple, mi aŭdis ses delegitojn el ses landoj. Ili uzis kvin malsamajn lingvojn :

La delegito de la Dominikana Respubliko, D-ro Arturo Despradel, parolis hispane.

La ministro de eksterlandaj aferoj de Jugoslavujo, s-ro Stanoje Simić, parolis france.

La delegito de Turkujo, s-ro Selim Sarper, parolis angle.

La ministro de eksterlandaj aferoj de Saŭdi-Arabujo, Emiro Feisal-al-Saud, parolis arabe.

La delegito de Kubo, ambasadoro D-ro Guillermo Belt, parolis hispane.

La ministro de eksterlandaj aferoj de la Ukraina Socialista Soveta Respubliko, s-ro Dmitri Z. Manuilski, parolis ruse.

Pri la uzo de lingvoj la Ĝenerala Kunveno havas jenajn regulojn : Ekzistas kvin « oficialaj » lingvoj (angla, franca, hispana, rusa, ĉina) kaj du « laboraj » lingvoj (angla kaj franca). Parolantoj povas uzi iun el la oficialaj lingvoj, sed oni tradukas nur en la laborajn lingvojn. Se delegito uzas neoficialan lingvon, li devas mem aranĝi por traduko en unu el la oficialaj lingvoj. La 22-an de septembro Princo Feisal-al-Saud, portanta impresan nacian kostumon kun blanka kaptuko, uzis sian propran lingvon, kiu estas neoficiala. Ŝajnas tamen, ke la parolado estis zorge preparita kaj ke angla traduko maŝinskribita estis donita al la tradukistoj antaŭ la kunveno.

Laŭ ĵurnalraportoj multaj delegitoj plendis, ke oni tradukas nur en du lingvojn, dum la radio-sistemo ebligas uzon de sep. Laŭ « New York Times » s-ro Leon E. Dostert, estro de la « samtempa » traduksistemo en UNO, respondis al tiuj plendoj, ke la uzo de pliaj lingvoj devus esti diskutata de la Ĝenerala Komitato de la Kunveno. Kompreneble la uzo de aliaj lingvoj necesigus multe pli multe da interpretistoj kaj mono.

La radio-tradukiloj, kies unuaj 1800 ekzempleroj nun estas uzataj en Flushing Meadow, utiligas principie la saman sistemon kiel la telefon-tradukiloj, kies funkciadon mi priskribis en artikolo aperinta en « Amerika Esperantisto » kaj en « Heroldo de Esperanto » (15 aprilo 1947). La ĉefa diferenco estas, ke oni ne bezonas tiom da elektraj ŝnuroj, sed ke oni elsendas la paroladon kaj ĝiajn tradukojn per radio, uzante diversajn ondlongojn. Oni uzas nur malmulte da elektra energio, ĉar oni bezonas disaŭdigon por nur kelkaj centoj da metroj. La telefonsistemo estas taŭga por relative malgrandaj kunvenoj. Por tre grandaj kunvenoj oni bezonas tiom da elektraj ŝnuroj, ke la aranĝo estus treege malfacila de la teknika vidpunkto kaj ke la risko de nefunkciado (se iu ŝnuro ŝiriĝas aŭ la izolado rompiĝas) estus grandega. La avantaĝoj de la « senfadena » kompare al la « fadena » sistemo do estas evidenta. Alia avantaĝo estas, ke delegitoj, kiuj foriras por manĝado, trinkado, fumado ktp., povas aŭskulti eĉ ekster la salonego kaj ke ĵurnalistoj povas sekvi la diskutojn, dum ili uzas sian skribmaŝinon en la apuda salono por la gazetaro.

Sed ekzistas ankaŭ malavantaĝoj. Unu el ili estas, ke ŝajnas esti malfacile, ĉiam disigi la ondlongojn de la diversaj lingvoj. La 22-an de septembro mi spertis sufiĉe ofte, ke du aŭ eĉ tri lingvoj « alvenis » samtempe tra miaj kapaŭskultiloj. Tio malhelpis la klarecon de la ricevo. Alia fakto estas, ke la baterio, kiun oni portas ĉirkaŭ la kolo, estas iom peza. Komence oni apenaŭ rimarkas tion, sed post kelkhora aŭskultado oni sentas sin vere ĝenata per tio. Tria faktoro estas la alta kosto de la sistemo. Post nur 40-hora uzo baterio estas eluzita kaj devas esti anstataŭigata. La radio-aparatoj mem ankaŭ sendube kostas multe pli ol la « fadena » telefon-aparatoj.

(Finota.)

Poloj kongresis en Varsovio.

Sabaton, la 4-an de oktobro, komenciĝis en la bele dekorita salono de Kontrolunuiĝo de Kooperativoj en Varsovio, sub la alta protekto de ministro-prezidanto Cyrankiewicz, la 11-a (2-a postmilita) Pollanda Esperantista Kongreso. Kunvenis al ĝi pli ol 150 partoprenantoj, eĉ el plej malproksimaj anguloj de la lando. Inter la kongresano trovigis la bofilino de la majstro, D-rino Wanda Zamenhof.

Post enkondukparolo de s-ro Zawada, prez. de la Asocio de Esperantistoj en Pollando, kaj blovorkestra ludo de la pola kaj esperanta himnoj, belan salutparoladon faris vicministro de klerigo s-ro Garnarczyk. Li konstatis ke instruado de Esperanto helpas al la junularo studi geografion kaj historion, kaj plivastigas ĝian horizonton. La vicministro deklaris sin *varma simpatianto al Esperanto*, kiun (li opinias) oni devas enkonduki en la lernejojn. Substrekinde estas, ke la antaŭan tagon s-ro vicministro vizitis la sekretariejon de la landa asocio, kie li deklaris ke li volas esti simpla esperantisto-soldato.

Inter la sekvintaj parolantoj estis reprezentanto de la Pola Skolta Unuiĝo, s-ro Pelman kiel reprezentanto de ĉeĥoslovakaj esperantistoj, kaj delegitoj de la filiaj grupoj de AEP. La delegito de Jeleniagora enmanigis al la vicministro de klerigo memorskribaĵon, subskribitan de ĉ. 80 diversaj organizaĵoj, partiaj komitatoj de ĉiuj demokratiaj partioj, kaj profesiaj unuiĝoj, por enkonduki Esperanton en lernejojn. Ni aldonu, ke simila memorskribajo, subskribita de 22 profesiaj unuiĝoj en Krakovo, estis enmanigita al la ministro de klerigo.

Post la salutparoloj, la ĝen. sekretario laŭtlegis saluttelegramojn kaj leterojn, interalie de fama pola poeto Julian Tuwim, kiu en koraj vortoj pardonpetis pro sia neĉeesto, skribinte ke « ĉiam vigla estas mia intereso pri la problemoj de la lingvo internacia kaj profunda mia admiro por la verko de D-ro Zamenhof ».

Post la oficiala parto de la solena malfermo, kiun finis speciale komponita marŝo « Verda Stelo », Prof. Sygnarski referis pri « La vojoj al realigo de Esperanto en la nuna tempo ».

Dum kunveno de delegitoj de filiaj grupoj raportis s-ro Dratwer pri la agado de la ĉefa estraro. 15 filioj estas legalizitaj de konformaj administrativaj aŭtoritatoj, kaj 13 estas legalizotaj. Ankaŭ la nombro de izolitaj esperantistoj konsiderinde kreskis.

Oni akceptis projekton de nova statuto, laŭ kiu oni elektis la ĉefan estraron kaj la konsilantaron.

Dum la kongreso oni akceptis vastan *deklaracion*, en kiu ni legas interalie : « La kunvenintoj dum la Dua Postmilita Tutpollanda Esp. Kongreso en Varsovio la 4-an kaj 5-an de oktobro 1947 salutas kun vera rekono la strebadojn de demokrata Polujo al libereco, monddemokratio kaj paco, ŝanĝoj kaj sociaj reformoj, al batalado kontraŭ faŝismo en unuigita fronto de ĉiuj progresemaj fortoj de la popolo, al edukado de polaj popolasoj en spirito de la internacia solidareco kun la mondo de laboro sur la tuta tero, al fratiĝo kun popoloj de la tuta mondo, kaj precipe kun la plej proksimaj, kaj popoloj de Sovetunio. »

La deklaracio poste preparolas la valorojn de Esperanto, substrekas ke Polujo estas la lulilo de Esperanto kaj, kiel lando de paca socia revolucio, estas pleje destinata por meti la problemon de lingvo internacia antaŭ la forumon de la popoloj kaj direkti la problemon de Esperanto sur ĝustan vojon.

Oni akceptis *laborplanon* por la venonta jaro, ankaŭ multajn proponojn kaj deziresprimojn, kaj oni ankaŭ decidis entrepreni paŝojn por konstrui en Varsovio *Internacian Esperantan Doman*, kiu estu simbolo de kunlaboro de la tutmonda esperantistaro ĉe la rekonstruo de Varsovio.

Dimanĉe antaŭtagmeze la kongresanoj per specialaj aŭtomobiloj veturis al la hebreja tombejo por honori la memoron de D-ro Zamenhof. Ĉe la tombo de la majstro parolis prez. Zawada, adv. Sakowicz en la nomo de UEA, kaj s-ro Geršater, kiu surmetis saketon da cindro, de bruligitoj en la kremaciejo de Majdanek. Poste oni veturis al la najbara katolika tombejo, por honori la memoron de Antoni Grabowski. Ĉiuj Varsoviaj gazetoj pli aŭ malpli detale raportis pri la kongreso.



Sao Paulo vidis en siaj muroj la 11-an Brazilan Kongreson de Esperanto.

De la 13-a ĝis la 21-a de septembro efektiviĝis en S. Paulo kun granda brilo la 11-a Brazila Kongreso de Esperanto. Diversaj ministroj kaj registaroj de brazilaj ŝtatoj sendis specialajn reprezentantojn, du oficialaj fervojoj donis senpagajn vojaĝojn al la kongresanoj por viziti la urbon Santos kaj Campinas, la poliestro de S. Paulo donis luksajn omnibusojn kaj afablajn policistojn por ĉiuj ekskursoj al rimarkindaj lokoj. La urbestro de Santos akceptis la kongresanojn kaj proponis al ili teon, post longa ekskurso tra la urbo en specialaj tramveturiloj senpage disponigitaj de la urbestro al la kongresanoj.

Dum la kongresa semajno funkciis por la kongresanoj speciala poŝtoficejo, kies stampo tekstis : XI BRAZILIA KONGRESO DE ESPERANTO — S. PAULO — BRAZILIO — 13-21 SET. 1947 — CORREIOS E TELEGRAFOS. — kaj en cirklo la taga dato de la stampajo.

Okaze de la vizito al la fama urbo Campinas, la kongresanoj restarigis la unuan Esperanto-societon iam fonditan en Brazilo, nome esperantistan grupon « Suda Stelaro », fonditan la 17.3.1906 de la pioniroj D-ro Joao Keating kaj ing. Tobias Rabelo Leite. Tiu unua grupo dormadis dum jardekoj, sed nun restarigis. Ties samideano tuj rekomencis la instruadon de la lingvo en la provizora sidejo de la grupo. La tuta gazetaro raportis pri la fakto.

Male al la 10-a Brazila Kongreso de Esperanto, kiu funkciis preskaŭ tute en nacia lingvo, la 11-a funkciis preskaŭ nur en Esperanto. Dum tri laborokunsidoj nur Esperanto estis permesita, kaj dum la solena malferma kaj ferma kunvidoj la nacia lingvo estis permesita kaj uzita de oficialaj reprezentantoj, sed la plej granda parto ankaŭ de tiuj kunvidoj efektiviĝis preskaŭ nur en Esperanto.

Oni konstatis, ke el la plej malproksimaj lokoj de Brazilo venis novaj samideanoj, kiuj ne vizitis antaŭajn kongresojn. Tio pruvas, ke nia movado renoviĝas ĉiam.

S. Paulo estas granda moderna urbo kun du milionoj da loĝantoj, tre riĉa kaj progresema. Rigardante tiajn urbejojn en la Nova Mondo, oni instinkte demandas al si mem : Kia estos la estonteco de Ameriko ? Ĉu tiaj urbejoj iam ricevos, kiel la eŭropaj urboj, la teruraĵojn de la milito ? Ĉu ni sekvos la vojon de la Malnova Mondo, de niaj prapatroj ? Ĉu Novjorko, Buenos Aires, Rio de Janeiro, S. Paulo, kiuj kreskadis en paco tiel rapide, iam estos, kiel Kartago, detruitaj de milito ?

Esperable ne ; la morala homo ankaŭ progresas kun la intelekta homo, kaj certe li kreas novan civilizacion pli homaman, pli saĝan, kaj ne plu estos militoj.

Post kelkaj jarcentoj Ameriko havos okcent milionojn da loĝantoj, venintajn el ĉiuj lokoj de la mondo. Jam nun niaj popoloj estas miksaĵo de ĉiuj rasoj. Iam la Nova Mondo estos rifugejo por la tuta homaro. Ni revu pri feliĉa estonteco por la homaro !

Nia Dek-unua estis granda sukceso. I.G.B.

Varbu nun por Heroldo!

Heroldo denove duonmonata.

Inkubo premas la redaktoron: La redakcia materialo ŝvelas kaj ŝvelas, kaj la *taŭdg* manuskriptoj sufiĉas jam por plenigi dek kompletajn numerojn.

Feliĉe, ekde la hodiaŭa numero *Heroldo denove povas aperi dufoje en la monato*. Tio donos al ni iom pli grandan «kubutliberecon». Bedaŭrinde, ĝis la nuna momento, nur duono de niaj abonantoj sendis al ni la petitajn karton pri sia intenco reaboni. La hodiaŭa numero ĝenerale estas ekspedita nur al tiuj, kiuj aŭ sendis al ni la petitajn karton, aŭ kies pago (aŭ la scigo pri illa pago) atingis nin ĝis la ekspeditado.

Nun estas ankaŭ la taiga tempo por *varbi novajn abonantojn al Heroldo*. Tio validas precipe por niaj amikoj en Belgio, Nederlando, Britujo, Svedlando, Danlando, Ĉeĥoslovakio, Svislando, Usono, kaj ĝenerale ĉiuj landoj, el kiuj estas eble, havigi la pagon al Belgio aŭ Nederlando. Usonanoj ne sendu al ni ĉekojn aŭ monbiletojn sed pagu al nia reprezentanto en Los Angeles.

Malnovaj numeroj. El 1947 ne plu estas liverblaj la numeroj 1-14. El 1946 estas ankoraŭ liverblaj kelkaj kompletaj jarkolektoj.

Abonantoj-Subtenantoj. Amikoj niaj, kies financa pozicio tion ebligas, estas petataj aliĝi kiel Abonanto-Subtenanto kun duobla kotizo, aŭ kiel Patronoj kun laŭvola kotizo. Tio ebligas al ni, liveri Heroldon senpage al multaj samideanoj, kiuj ne povas pagi, precipe en Polujo, Rumanujo kaj kelkaj aliaj landoj. Por la pasinta abonperiodo ni citas ankoraŭ, kun kora danko, la jenajn Subtenantojn: S-ino Staes, Koekelberg-Bruselo; R. Robertson, Londono; f-ino M. Keiser, Hago; E. Mila, Drancy. La ceterajn ni jam menciis en pli fruaj numeroj.

Por la nova abonperiodo jam aliĝis kiel Subtenantoj: J. s-ro T. J. Guérille, Surbiton; 2. s-ro J. Course, Royston. Ankaŭ al ili koran dankon!

VERDSTELAJ RADIOJ

— *Harald Thilander fariĝis 70-jara*. Ĉiu esperantisto scias kiu li estas: eldonanto kaj redaktoro de blindulaj presajoj naciolingvaj kaj Esperantaj, pioniro de Esperanto ĉe la blinduloj, «profeto de la blindopolo» (kiel lin nomis kompetenta aŭtoro jam antaŭ trideko da jaroj). La tuta esperantistaro kore gratulas la jubileulon.

— La subskriboj por la *Petskribo al UNO* sumiĝas nun je 300.000. De nun estas akceptataj ankaŭ kolektivaj subskriboj de organizaĵoj, sed ili devas esti legitimitaj.

— *104-jara kuracisto* Alfredo Antonio Osorio, diplomita en Parizo en la jaro 1862, lernis *Esperanton* nunjare en kurso de s-ano F. Doblaz Filho en Rio de Janeiro.

— *Argentina Esperanto-Ligo* havas 12 subgrupojn en 11 urboj: Buenos Aires, Bahia Blanca, Cordoba, Esperanza, La Plata, Marcos Juarez, Mar del Plata, Mendoza, Necochea, Rosario kaj Tartagal. Alia grupo ekzistas en Goya, kaj du novaj estas fondotaj en Florida kaj Quilmes.

— En *Brazilo* fondiĝis dum la lasta tempo novaj Esp.-grupoj en João Pessoa, Manaus kaj Uberaba. En Popola Universitato «Presidente Roosevelt» en S. Paulo okazas Esp.-kurso de Prof. C. Leite de Moraes. Aliaj kursoj en diversaj brazilaj urboj.

— El *Britujo* oni anoncas novajn Esp.-kursojn en Andover, Birmingham, Bristol, Coulsdon, Derby, Huddersfield, Liverpool, London, Manchester, Newcastle kaj Sutton; novaj grupoj fondiĝis en Belfast kaj Blackleigh. Regionaj konferencoj okazis en Blackburn (pli ol 100 p.) kaj Huddersfield.

— Dum la *Internacia Gdanska Foiro* okazis Esperanto-Tago (9.-10.10.), partoprenita de preskaŭ 100 samideanoj el diversaj polaj urboj. En la Foiro estis bela Esp.-stano, kaj la poŝtoŝtampoj stampis dum tiu tago ĉiujn poŝtoŝtampojn per *esperantlingva stampo* «Internacia Esperanto-Tago».

— *Skolta Komando en Sopot* (Polujo) nomis specialan referanton por Esperantaj aferoj kaj intencas, en la tago de S-ta Georgo fari distrikatan ekspozicion de skoltaj Esperantistoj, dediĉitan al internacia skolta proksimiĝo.

— En *Schwäbisch Gemünd* okazis la 11. 10. unua kunveno de rifuĝintaj *litovaj esperantistoj*, vivantaj en Germanujo. Okaze de (neesperanta) kurso por PCIRO-oficistoj (21.7.-1.8.) en *Geislingen*, partoprenita de estonaj, litovaj, polaj, ukrainaj kaj judaj rifuĝintoj (D.P.), la ukraina poeto Z. Herasymoviĉ atentigis pri la signifo de Esperanto por rifuĝintoj.

— Post propagandkunveno en *Kopenhago*, la 25.9., partoprenita de 180 p., 70 enskribiĝis por novaj Esp.-kursoj. Dana lernejo Nörskov Skole pr. Farre enkondukis *Esperanton kiel devigan fakon*. Alia dana lernejo, la Teknika Lernejo en Augustenborg, enkondukis Esperanton kiel instruofakon.

— En *Charleroi* fondiĝis Regiona Esperantista Grupo, prezidata de ing. Marc Deforge. Adreso: François Charles, 155 rue Armand Bocquet, Farcennes, Belgio.

— En septembro la *Finna Radio* ricevis amason da leteroj postulantaj Esp.-dissendojn. Oni povas atendi, ke tiu leter-inundo ne restos senefika.

— La urbestro de *Budapest* denove aranĝas je kosto de la urbo Esp.-kursojn en la Edukscienca Instituto por ĝeoprofesoroj kaj ĝeinstruistoj de la ĉefurbo. Ankaŭ la Popoleduka Centro anoncis en kelkaj vesperaj lernejoj de Budapest inter la lingvakursoj Esperanton.

— En *Aŭstrio* fondiĝis novaj Esp.-grupoj en Keferfeld ĉe Linz, Graz, Saalfelden kaj St. Valentin. En nove fondita *Popola Allernejo en Linz* gvidas Esp.-kurson fervoj-oficisto kaj komunuma konsilanto Wilhelm Namors, estrarano de la loka grupo «Estonto».

Honto!

La artikoleto de Urtiko en la pasinta numero vekis diversflankan eĥon. Nederlanda samideano, f-ino Postma, kiu jam la 10-an de septembro sendis al ni proteston por la «Libera Tribuno» kontraŭ la malhelpo al la germanoj, publike paroli en Bern (tiu protesto pro manko de loko ne povis aperi), skribas al ni: «Ĉu tio estas ĉio, kio estos dirata pri tiu afero? Tiam mi tute ne estas kontenta. Neniu kompreno el tiuj simplaj vortoj kio okazis.» Ĝi estas prava. Ĉi-sekve ni publikigas leteron de s-ro C. C. Goldsmith, la ĝen. sekr. de UEA, kiu sufiĉe klarigas la aferon:

Kun iom da surprizo mi legis la artikoleton «Honto» en n-ro 1075 de Heroldo, kaj estas bedaŭrinde ke oni ne faris esploron pri la menciita afero, antaŭ ol presigi tian informon. Ĝi donas absolute falsan impreson al la leganto, ĉar ne estis la LKK aŭ UEA, kiu malhelpis al germano saluti la kongreson. Jen kio vere okazis en Bern.

Ricevinte informon ke du germanoj ĉeestis la kongreson kaj deziras saluti ĝin, la komitato de UEA diskutis la aferon kaj decidis ke unu el ili saluti la kongreson en la tria laborokunsido. Tion ni aranĝis kun s-ro Erich Dahlmann el Berlino.

La kongresanoj aŭdis pri tiu decido, kredeble de la germanoj mem, kaj la gvidanto de la poloj, kiuj ĉeestis la kongreson, venis al ni kun la informo, ke se germano salutis la kongreson, ĉiuj palestinanoj kaj poloj levigis, protestus kaj forlasis la kongreson.

Komprenoble, ni ne deziris vidi tian skandalon en la unua postmilita kongreso, kaj ni klarigis la situacion al s-ro Dahlmann. Li estas, feliĉe, komprenema viro, kaj por eviti treege malagrablan epizodon, li bonvole rezignis pri la salut-paroladeto.

Jen ĉio. Ni ne deziris publikigi tian informon, sed la presigo de la menciita artikolo devigas tion.

C. C. GOLDSMITH, Sekretario.

F-ino Postma insistas pri la publikigo de sia artikolo. Tial ni publikigas ĝin ĉi tie almenaŭ ekstrakte:

Mi ĝis nun opiniis, ke Esperanto interfratigas la popolojn. Esperanto ne demandas pri nacieco, religio ktp. En Esperantujo ni ĉiam estu antaŭ ĉio Esperantistoj.

Nun mi demandas al vi, al la tuta esperantistaro: Ĉu ne estas granda honto, ke oni malpermesas en Esperanto-kongreso al germanoj la parolon? Ĉu neniu el la kongresanoj protestis kontraŭ tiu decido?

Per tio ni mem piedbatas ilin en angulon, per tio ni mem kondukas la malamikecon inter nin, ni mem ne plu povas paroli pri la fama interfratigo per Esperanto. Inter esperantistoj ne estu parolo pri malamiko, inter esperantistoj ni ne scias, ĉu ni estas germano, franco, polo, judo, aŭ kiu ajn.

Kion estus dirinta D-ro Zamenhof? Kion diros la mondo pri tio? Se ne estas paco kaj amikeco inter ni, kiel povas ekzisti tio en la mondo?

Oni prenu la Jamboreon en Francujo kiel ekzemplon, kie la germanoj estis bone kaj kore akceptataj.

Tj. POSTMA.

Oni povas aldoni, ke la *SAT-Kongreso* esprimis bedaŭron pri tio ke la germanaj kamaradoj ne povis ĉeesti tiun kongreson. Vere, ni estas esperantistoj laŭ la *ideoj de Zamenhof*, aŭ ni estas *nur lernintoj de la lingvo Esperanto*, kiel aliaj estas lernintoj de la angla, franca aŭ rusa. Se ni mem rifuzas la ideojn de Zamenhof, kiel do ni rajtus riproĉi eĉ tiujn nemultajn inter la esperantistoj germanaj, kiuj plene aprobis kaj volonte subtenis la Hitler-regimon?

Salutoj kaj respondoj.

La esperantistaro de Sofia (Bulgario), sendinte salutleteron al la Vicprezidanto de Usono, s-ro *Henry A. Wallace*, ricevis respondon de la sekretario de Wallace, s-ro V. Scott. La respondo, direktita al la prezidanto de Sofia Esperanto-Societo, tekstas tradukita: «Kara S-ro Konkowski, S-ro Wallace petis min esprimi lian aitan ŝaton pri via letero kaj ties interesaj komentoj. Li opinias, ke unu el niaj plej valoraj liberoj estas la rajto lerni la veron; kaj tial li volonte akceptas ĉiujn opiniojn kaj sugestojn.»

Ang'aj samideanoj kaj neesperantistoj en kunveno de ĉ. 1000 personoj akceptis sendi kolektivajn salutleteron (esperantlingvan) al la bulgara ĉefministro *G. Dimitrov*. Ĉi tiu respondis pere de la redaktoro de «Int. Kulturo», s-ano As. Grigorov.

Lingva kaoso en Oriento.

Japanujo. «Pravo lidu», Praha, raportis en japanujo artikolo, ke Japanujo riprenas eblecon reformi la malfacilegan ideografian skribon japanan. «Dum iuj serĉas novan skribon, aliaj preferas novan lingvon, kiu similas al Esperanto,» skribas la ĉeĥa gazeto.

Hindujo. Ĉeĥa abato de budhana monaĥejo en Cejlono, s-ano Nyanasatta, sendis al Praha interesan eltondaĵon el «The Times of Ceylon Sunday Illustrated», de 5.5.46, kun ilustraĵo subskribita: «Speakistano». Sur la ilustraĵo, grupo da hindoj estas kverelanta pri lingva demando. Unu el ili manskermas per tabuleto: «Nur la singalan!» Alia persono, simila al Ghandi, tenas tabuleton kun fuŝangla surskribo: «Ni ne paroli tiun anglan!» Tria svingas lujn flagetojn, kaj kvara montras per fingro al sia eligita lango, kun neskribita demando en la okuloj: Ĉu mia lango kapablas prononci tiun lingvon? Kaj antaŭ la indignita grupo staras trankvile hindu, en digna pozo, vestita en ĵugista talaro, kaj mantananta netrude, kvazaŭ preterpase, tabuleton kun surskribo: ESPERANTO! Sub la bildo estas teksto: «The Languages Committee makes itself understood in India.» Jes, ankaŭ por Hindujo Esperanto povus esti la elirejo el la kaoso. J.M.

Mirin Dajo — ĉu vere mirindaĵo?

Pluraj legantoj demandis nin pri Mirin Dajo, la nevundebla nederlandano kun la Esperanta nomo, ĉu lia nevundebleco ne simple estas trompo. Ni povas certigi ilin, ke la raportoj pri li estas bazitaj sur veraj faktoj. Multaj personoj svenis, vidante lin trapikita; la sama okazis al personoj kiuj nur vidis filmon pri la eksperimentoj, por kiuj li disponigis sin. La Esperanto-societo en Zürich profitigis la restadon de Mirin Dajo en Svislando por arangi kunvenon kun parolado de li. Okaze de tiu kunveno la prezidanto de la societo, s-ro H. Hammer, verkis poemon, el kiu (pro manko de loko) ni citas nur unu strofon:

*La mirinda fenomeno
Staras antaŭ la okuloj:
Mirindaĵo! Sen kompreno
Gapas eĉ la scienculoj.*

Versajne oni povos legi la tutan poemon, kun detala raporto, en la unua numero de la reaperronta «Praktiko».

Ĉu per iu alia lingvo estas atingebla tia rezultato?

Usona samideano J. D. Sayers, nun en Germanujo, raportas pri granda intereso por Esperanto precipe en la usona kaj brita zonoj de tiu lando, kie ekzistas jam denove pli ol 5000 organizitaj esperantistoj. Li mem instruis Esperanton i.a. al iu s-ino H. kaj D-ro W., kiuj mem nun jam instruas la lingvon. Li komencis instrui ilin laŭ la libro «Das leichte Esperanto»; ili komencis dum la lasta semajno de februaro, finis du lecionojn la unuan vesperon, poste studis dufoje semajno po unu leciono, kaj finis la kurson post 5 1/2 semajnoj. Je la lasta leciono, post kiam ili finis la libron, ili komencis paroli en Esperanto, kaj de minuto al minuto ilia parolado fariĝis pli korekta kaj pli flua. Post pli ol horo, D-ro W. subite ekkriis: «Ho, mi ĵus realigas al mi ke ni paroladis nur Esperante dum longa tempo! Mi apenaŭ povas kredi ĝin!» Kaj s-ino H. konsentis, dirante ke, se li estus dirinta al ŝi antaŭ du monatoj ke tia rezulto estas ebla, ŝi estus kredinta ke tia aserto estas nur fantazio kaj ne vera.

Por filatelistoj: maksimumkartoj.

Union Maximophile Internationale en Dijon (Francujo) akceptis Esperanton inter la lingvoj uzotaj de ĝi kaj aperigas esperantlingvan kronikon en sia monata bulteno. «Maksimafilo» estas la nomo de nova filatela branĉo. Temas pri la kolektado de bildkartoj, sur kiuj aplikiĝas (bildflanke) poŝtmarkoj, kiuj montras la saman bildon kiel la bildkarto (faman personon, konatan konstruaĵon, pejzaĝon ktp.). La analogeco estas maksimuma, se ankaŭ la poŝtstampo montras saman bildon.

Nia redakcio ricevis tian perfekte-maksimuman karton: ĝi montras sur la bildo de la karto, sur la poŝtmarko kaj sur la poŝtstampo la faman katedralon de la hungara urbo Esztergom. Ĝin sendis al ni la *Esperanto-Kulturservo*, Jolsva u. 4, *Budapest III*, Hungarujo, kiu ankaŭ slavice eldonis analogkarton kun bildo de mezepoka revoluciuo György Dozsa, kun Esperanto-teksto kaj kun poŝtmarko montranta la saman revoluciuon. La nomita Kulturservo sendos bele stampitan analogkarton kontraŭ 1 respondkuponon; kontraŭ 2 respondkuponoj ĝi sendos fotokarton.

Internacia Kongreso de Esperantistaj Maristoj

okazos la 30.5.1948 en Fécamp, ĉarmplena haveno apud Le Havre. Certe multaj maristoj partoprenos tiun gravan kongreson internacian, kiu estas organizota samtempe kiel la ampleksa regiona kongreso de la normandaj esperantistoj. Sendu aliĝojn, kuraĝigan poŝtkarton ktp. al s-ro Delamare, kongresa sekretario, 32 rue Alexandre-Legros, Fécamp (Seine-Inf.), Francujo.

Okcidentalista ofensivo.

Okcidentalistoj en Praha kaj ilia centro en Svislando klopodas lastatempe subfosii la pozicion de Esperanto en la Ĉeĥoslovakia Radio, ĉe la koncernaĵo oficejo kaj en la gazetaro. Temas evidente pri interkonsentita ofensivo kontraŭ Esperanto. Signojn pri la agado de P okcidentalistoj oni konstatis ankaŭ en la svisa gazetaro.

J. M., Praha.

Speciala Esperanto-poŝtstampo

estis aplikita okaze de la Revelo-Kongreso en Krefeld (Germanujo). Jen ĝia teksto: (22a) Krefeld, Rejnlanda-Vestfalia Esperanto-Kongreso, Rheinisch Westfälischer Esperanto-Kongress 13.-15. September 1947; krome la dato, horo, kaj la blazono de la urbo Krefeld.

Kiu helpas al malsatantoj?

Alfred Niessler, Unter-Hausmehring Nr. 59 1/2, (13 b) *Dorfen-Mark* (Obb.). US-zono, Germanujo, antaŭ la milito, persekutite de Gestapo, forlasis sian hejmon en Breslau (Silezio) kaj rifuĝis eksterlanden. La milito surprizis lin en Belgio; poste li estis kaptito en koncentrejo de la Vichy-registaro kaj en germana punejo. Kiam, mallonge antaŭ la falo de la reĝimo, oni volis ankoraŭ soldatigi lin, li forkuris kaj sin kasis. Sed fine opiniante ke li povos reveni hejmen, jam sen timo pro Gestapo, li devis forlasi sian hejmlandon, kiel forpelito, kaj nun estas senhava kaj malsatanta.

Ankoraŭ alia samideano devis forlasi la urbon Breslau (nun pola urbo Wroclaw) kaj perdis ĉion. Li estas filo de fama estrarano de Germana Esp.-Asocio Georg Habellok (mortinta en aprilo 1940) kaj nomigis *Gerhard Habellok*, nuna adreso: Dimpfelstr. 32, (10) Leipzig N 24, rusa zono. Liaj tri infanoj (3, 6 kaj 12 j.) ege malsatas, do malsana je pulmoftizo (t.b. c.). — kaj ili certe estas senkupaĵoj pri la mizero S-ano Habellok petas helpon por siaj infanoj.



Bonvenon al la 33-a!

La venontjara Universala Kongreso de Esperanto okazos en Malmö. Pro valutaj cirkonstancoj la sveda Esperanto-movado elektis la nomitan urbon en la plej suda provinco, ĉar ĝi estas sufiĉe proksima al la plej granda parto de la eŭropa kontinento.

La sveda movado kore bonvenigas vin al la 33-a, al la kongresa urbo, al la provinco Skanio kaj cetera al la tuta Svedujo. Ni esperas, ke la kongreso estos rezultoriĉa, kaj ke ĝi alportos novan energion al la movado.

Jam nun anoncu vin! Petu informojn kaj aliĝilojn ĉe: *33-a Universala Kongreso de Esperanto, Malmö, Svedujo*.

LOKA KONGRESA KOMITATO.

Intertempe la Loka Kongresa Komitato definitive formiĝis kaj jam eldonis la unuan informilon. La Komitato konsistas el la jenaj personoj: Prez. Jan Ströme, vicprez. Oscar Runerheim kaj Helge Andrén, ĝen. sekr. O. T. Nicolaisen, sekr. Ester Andrén kaj Gösta Henriksson, kas. Alve Persson kaj Harry Nilsson. Krome estas formitaj specialaj sekcioj: programa, presa-propaganda, logika kaj financa. Granda nombro da lokaj samideanoj estas membroj de la LKK sen specialaj funkcioj.

Aliĝu, se eble, antaŭ la 31.12.1947; post tiu dato la kongreskotizoj plialtiĝos. Provizore ili estas: por kongresano sved. kr. 20, por edzo aŭ edzino de kongresano kr. 10, por junul(in)o ne pli ol 20-jara kr. 8.

Definitiva programo ankoraŭ ne estas fiksitita, nek jam fiksebla; la tuttaga ekskurso (krozado) okazas en la markolo Öresund kun vizito al urbo Helsingborg. Postkongresaj ekskursoj al Stockholm kaj al Laponio.

Pluaj detaloj sekvos.

ŜAKO

PROBLEMO N-ro 1.

De *Torsten Lindberg*, Prässebo.

Blanko: Rh6, Dd2, Td4, Pb4, g2, g7 (6). Nigro: Re5, Ta6, Ke6, Pa5, b6, d7, e4, g6 (8). Mato en 3 movoj.

Ĉe reĝatoko ofte estas prezentataj diversaj oferoj por kombina celo. Ju pli grandvalora la oferota peco estas, des pli impresa ofte estas la ofero. Sed ofte troviĝas oferoj por pozicia celo. Tiukaze la peonofero estas unu el la plej oftaj, tre efika kaj rafinita kiel en la sekva partifino.

PARTIFINO N-ro 2.

En la partio *B. Nielsen* (Danujo) kontraŭ *H. Grob* (Svisujo) ĉe la ŝakolimpiado en München 1936 estiĝis la jena pozicio:

Rg1, Dd1, Ta1, f1, Kc1, e2, Cc3, d4, Pa2, b2, c2, e4, f2, g2, h2 (15). Re8, Dc7, Ta8, h8, Kc8, f8, Cc6, f6, Pa6, b7, d6, e7, f7, g7, h7 (15).

8. Cc3-d5!

Oferproponas peonon. Nigro akceptas, ĉar post 8. — Dd8 sekvas 9. Ke3, minacante Cxc6 kaj Kb6.

8. — Cf6xd5 9. e4xd5 Cc6xd4 10. Dd1xd4 Dc7xc2 11. Tf1-e1 Dc2-c5 12. Dd4-d3

Ĝis nun estis facile por nigro. Sed nun komenciĝas la malfacilaĵoj, ĉar la nigra reĝo devas veni al sekura loko. Oni ne povas pensi pri arokego, kaj post 12. — g6 (por ludi Kg7 kaj 0-0) venos la tre malfacila 13. Ke3 kaj Kd4. Tamen nigro ne volas konfesi, ke la malfermo estis erara, kaj ekprenas la radikalan sed danĝeran rimedon e7-e6.

12. — e7-e6 13. d5xe6 f7xe6 14. Ke2-g4 e6-e5 Aŭ Rf7 15. Df3+ ktp.

15. Kg4-h5+ g7-g6 16. Kh5xg6+! Re8-d8 Post 16. — hxg gajnos 17. Dxc6+ Rd8 18. Kg5+ Ke7 19. Kxe7 Rxe7 20. Dg7+.

17. Kc1-g5+ Por devigi la nigran kurieron al e7 kaj tiamaniere bloki tiun kampeton por la reĝo.

17. — Kf8-e7 18. Ta1-c1 Dc5-b6 La damo devas gardadi d6. Blanko nun devigas la damon for de b6 kaj ekokupas tiun ĉi kampeton por la decidiga ŝakigo.

19. Kg5-e3 Db6-b4 Se 19. — Da5, jen 20. b4!, kaj se 19. — Db5, jen 20. Dxb5 axb 21. Kb6+ Rd7 22. Kf5+ kaj gajnos.

20. a2-a3 Db6xb2 21. Tc1-b1 Db2-a2 22. Ke3-b6+ Rd8-d7 23. Dd3-h3+ Rezigno.

Post 23. — De6 gajnos 24. Kf5 la damon, kaj post 23. — Rc6 sekvas mato en malmultaj movoj per 24. Tec1+ ktp.

(Rim. Laŭ la libro «Kongeangrebet», t.e. «La reĝatoko», de B. Nielsen.)

Ĉu vi volas ludi korespondpartiojn per Esperanto? Se jes, anoncu vin al *D-ro V. Faigl, Zlonice* (Ĉeĥoslovakio), kiu estas turnirgvidanto por la esperantista sekcio de la Internacia Korespondŝaka Ligo. Deko da grupoj po 7 partoprenantoj jam estas funkciintaj.

Adreso por la ŝak-kolono: *Torsten Lindberg, Prässebo* (Svedujo).

E. Z. Obolo :

Tiuj damnitaj Nederlandanoj!

Germanaj religiuloj ne havis lokon por Gestapano.

Alveninte ĉe la malsanulejo, la ŝoforo forveturis, kaj Maks sonorigis ĉe la pordego. Oni malfermis, kaj Maks eniris. Estis germanaj religiuloj, kiuj mastrumis tiun malsanulejon. Maks sciis tion kaj decidis elprovi, ĉu ili estas fidindaj. Li estis allasata ĉe la supera fratulino, la estrino de la domo. Kun multa aplombo li ŝajnis esti sekreta germana policisto, por aŭdi kion ŝi diros. « Bedaŭrinde li ne povos resti : oni tute ne havas lokon por li ! »

Nur tiam li rakontis ke estis la Gestapo kiu pafvundis lin. Oni telefonis al la ŝoforo, kiu intertempe estis reveninta al sia mastro, kaj nur tiam oni kredis ke li diris la veron.

Nun li tuj estis allasata, kaj oni volis doni al li la plej belan ĉambron, sed li rifuzis ricevi ĉambron por si sola. Li volis havi dupersonan ĉambron, kaj la superulino zorgu ke li neniam restu tutsola. Oni tuj aranĝis ĉion laŭ lia deziro. Al li mankis nenio.

La sekvintan tagon venis *Herr Schöber* por la pridemandado. Maks kompreneble « nenion sciis pri la judoj » ; cetere oni tie ne serĉis Maks sed tiun, por kiu li estis gardostarinta en la malgranda vilao. Maks kompreneble ankaŭ « ne konis tiun alian personon sed nur hazarde estis tie por ŝirmi sin kontraŭ la pluvo en tiu nelogata domo ».

Tiu alia, konata komunisto, pli poste povis esti avertata. Maks kelkajn semajnojn poste, je la dua Kristnasko-tago, vespere, kaŝe forlasis la malsanulejon per ŝnuro farita el kelkaj litotukoj, kvankam lia kruro ankoraŭ ne tute estis resaniĝinta. Post plena resaniĝo li iris pli suden, kaj la Gestapo neniam plu kaptis lin. Ankaŭ la komunisto sin savis.

Henk sciis trompi la naziojn.

En n-ro 12 ni skribis pri perfido, pro kiu unu el la plej fervoraj subteruloj kun 52 aliaj partizanoj, inter ili lia stabo, falis en la manojn de la Gestapo. Nur du personoj el tiu stabo sukcesis tiam eviti arestiĝon. Unu de tiuj du estis la jam nomita Maks, kies tasko post la perfido estis reorganizi la t.n. Informservon, — kun granda sukceso li solvis tiun taskon, kiu estis malfacila, ĉar pro la aresto de la 53 partizanoj tiu servo estis tute disbatita. La alia — ni nomu lin Henk — estis ano de la O.D. (Ordoservo), servo kiu ĝis la perfido, oka-

PAROLAS LA LEGANTO.

ABSURDAĴOJ.

Ŝajnas, ke en kelloj landoj nuntempe oni faras la jenajn ekonomiajn absurdaĵojn : a) Oni eksportadas plej bonajn enlandajn produktojn kaj samtempe importadas malpli bonajn (aŭ ne pli bonajn) produktojn de la sama speco — vi jam aperigis rakonton pri tio rilate al fromaĝoj de Francujo kaj Svislando ; b) Oni detruas nutraĵojn kaj produktaĵojn, kiujn la popolo povus konsumadi, se oni distribuus ilin.

Mi dankus al legantoj, kiuj sendus al mi *aŭtentikajn* ekzemplojn de tiaj absurdaĵoj, kiuj okazas en iliaj propraj landoj.

Mi ankaŭ volas scii, ĉu legantoj subtenus la starigon de Tutmonda Asocio de Socikreditanoj. (Adreso : J. W. Leslie, 50 Hillfield Park, Muswell Hill, London N. 10.) J. W. L.

ĈU ESPERANTISTA (MAL)VIRTO ?

Mi estas maljuna esperantisto kaj amiko de Heroldo, kiun mi abonis jam en malproksima 1923. Mi estas ankaŭ filatelisto kaj pere de interŝanĝo laŭ anojn en Heroldo mi kolektis multajn poŝtmarkojn. Fine ĉi-jare mi ree abonis Heroldon kaj laŭ mia malnova kutimo klopodis interŝanĝi poŝtmarkojn laŭ anojn. Sed miaj skribaĵoj restis sen respondo, kaj la senditaj poŝtmarkoj restis sen interŝanĝo. Unuatempe mi pensis pri poŝtmalhelpoj k.s., sed de kiam mi skribis al itala samideano kaj ne ricevis respondon, mi pensas, ke la novaj esperantistoj estas ne tiel fidindaj (eble mia opinio estas tro severa) kiel la malnovaj esperantistoj, kiuj preskaŭ ĉiam plenumis siajn promesojn. Ĉu tia estas la nova esperantista virto ? Se esperantistoj ne respondas, al kio servas Esperanto ?

E. GABRIELLI, Brentonico, Italio.

zinta en 1943, bonege laboris. La perfidulo sidis en Londono, kie li ŝajnis agi por la nederlanda registaro ; sed en vero li laboris por la Gestapo.

La OD-ano, do Henk, estis lertulo, kiu ankaŭ faris desegnojn de fortikaĵoj ktp. Jam en 1941 lia subtera agado kondukis lin en la malliberejon de Scheveningen — fifame konatan sub la nomo « Oranje-Hotel », el kiu oni pli poste reliberigis lin pro manko de pruvoj. La reorganizo de la Ordoservo estis iom facila ; ĝi konsistis ĉefe en antaŭpreparoj por la momento, kiam Nederlando estus liberigita.

Henk sciis, kiel kuriero de la OD-stabo, ĉiujn artifikojn por trompi la naziojn. Li posedis i.a. vagonaran ŝlosilon, kiu adaptiĝis al ĉiuj seruroj en vagonaro. Bonega ideo por, dum longaj distancoj, kaŝi gravajn dokumentojn en ŝranketo en la neceseja apartamento, kaj por repreni ilin tie, kiam li atingis la celon de sia vojaĝo. Ankaŭ biciklostangoj bone taŭgis por kaŝi dokumentojn en ilia interno. La biciklon oni povis deponi en pakaj-vagono, ĝis la celo de la vojaĝo estis atingita. Vagonara ŝlosilo estis facile kaŝebla okaze de kontroloj, kiuj ofte okazis. Tiuj damnitaj nederlandanoj !

(*Daŭrigota.*)

EKZAMENU VIN MEM !

Respondoj

al la demandoj en la pasinta numero.

- 91. La 7-a en 1911, kaj la 20-a en 1928.
- 92. Bayol estis antaŭbatalanto por Esperanto ĉe la Ruĝa Kruco.
- 93. Edzino pli elverŝas per funelo, ol edzo enverŝas per sitelo. (Proverbaro Esperanta, p. 33.)
- 94. a) Gramofondisko esperantlingva ; b) Esperanta voĉo perradia ; c) Esperantistino.
- 95. El Philip Oppenheim : Riĉa kaj sen mono, ĉap. 13.
- Novaj demandoj kaj taskoj.*
- 96. Kie mortis kaj kie estas enterigita la fama ĉeĥa sciencisto kaj pioniro de la mondlingva ideo, Jan Amos Komensky (Comenius) ?
- 97. Kion signifas F.L.E. (origine), F.L.E., F.E.I., F.E. ?
- 98. Afga, Esk, Etem, Nepo, Orba, Parla, Ro, Simplo, Tal. — La antaŭe nomitaj vortoj nomas diversajn projektojn de mondlingvoj kiuj malsukcesis. Ordu ilin tiel, ke iliaj komenciliteroj indikos mondlingvon kiu sukcesis.
- 99. Facila problemo, komunikita de s-ro B. S. Ohana, Marrakeĉ : Ĉirkaŭ tablo sidas : 1 avo, 2 patroj, 2 patrinoj, 4 gefiloj, 3 nepoj, 1 frato, 2 fratinoj, 2 filoj, 2 filinoj, 2 edzoj, 2 edzinoj, 1 fianĉo, 1 fianĉino kaj 1 novedzino. La tablo devas esti tre granda, vi opinias ? Ne, estas entute nur 7 personoj. Klarigu !
- 100. En kiu jaro Esperanto festos sian 100-jaran jubileon ?

Cent pilkoj perdiĝas, Mil pilkoj perdiĝas ...

kaj milionoj da pilkoj perdiĝos. Finfine unu pilko revenos al vi, kaj ... Sed aŭskultu ! Temas pri la malfacila tasko de l' atom-sciencistoj por eltrovi, kiamaniere oni povas utiligi la atom-energien por industriaj celoj. D-ro Robert Dudley Fowler, atom-sciencisto ĉe la John Hopkins Universitato, komparas la provojn por eltrovi, per ciklotrono, « kio estas en la atomo », kun jetado de tenisilko al nevidebla celo. Imagu ke vi staras en vasta kamparo, viaj okuloj estas kovritaj, kaj ĉe viaj piedoj kuŝas nelimigita nombro da tenisilkoj. Ie en la proksimeco troviĝas, por vi nevidebla, ŝtalo kun besto en ĝi. Ie en la muro de la ŝtalo troviĝas malgranda truo. Via tasko nun estas, ne forlasante vian lokon, determini kiuspeca besto troviĝas en la ŝtalo.

Unue vi jetos multajn pilkojn en diversaj direktoj. Fine unu el viaj pilkoj trafos la ŝtalon. Tiam vi jam scios, en kiu direkto vi devas ĵeti. Cent pilkojn vi jetos, mil pilkojn vi jetos. Fine unu pilko trafos ĝuste tra la truo. Vi daŭrigos la jetadon. Mil pilkojn vi jetos, dek mil pilkojn vi jetos. Fine unu pilko trafos la beston kaj falos sur la teron. Ankoraŭ vi daŭrigos. Dek mil pilkojn vi jetos, cent mil pilkojn vi jetos. Milionojn da pilkoj vi jetos. Finfine unu pilko trafos la beston, resaltes de ĝi, revene trafos duan fojon precize tra la truo, kaj refluos tiel bonŝance ke ĝi revenos en vian manon ! Kaj tiam provu, laŭ la odoro, kiun la pilko alportis el la ŝtalo, flardiveni kiuspeca besto troviĝas en la ŝtalo.

Tiel ŝajne senŝanca estas la tasko de la atom-sciencistoj. Tamen ĝi estas entreprenita kaj, estu certa, ĝi sukcesos — ĉu post cent jaroj, ĉu, dank' al ia feliĉa hazardo, jam baldaŭ.

de Heopsa piramido por elkalkuli laŭ ili kaj fiksi la daton de l' Dua Alveno. Poetoj (oni erare nomas ilin arkeologoj) vane deĉifras la komplikajn desegnoskribaĵojn de antikvaj idoloj, por revoki al vivo la vortsonojn de pasintec-ombroj, sub sablo entombigitaj. Kaj vantuloj penadas tralegi la misterojn de Postmonda Revelacio, de sur la ŝtona, esprimanka vizaĝmasko de la Sfinkso ... Forlasu ni, kara leganto, la afrikan bordon ; alie ni ambaŭ ekfariĝos mistikuloj !

EL : VERSAĴOJ DE JoE.

Se povus mi ...

Se povus mi pluvigi ĝojon sur cin kaj cian vivo-vojon ; Se povus mi kreskiĝi florojn por anstataŭi la dolorojn ; Se povus krei mi je-ordon, malfermi paradizo-pordon ; Nu, tion ĉion, kaj eĉ pli, mi farus ... eble ja ... por ci.

Kun ore! sur mia sino.


Kun ore! sur mia sino Do aŭskultu, karulino, Kion mia kor' deklamas — Vin mi amas ! Vin mi amas ! Kredu do je tiu kanto, Kor' ne estas mensoganto, Tie nur la vero flamas — Vin mi amas ! Vin mi amas !

Revante.

Kuŝi, mi ŝatas, sur sablo la ora, apud mar-ondoj kaj mevoj ... Aventurime, ĝis bordo plej fora, ĝliti per ŝipo el revoj ...

Jen la besto !

Hundoj krude batalantaj pro l' viando ; Viroj sange militantaj por la lando ; Jen LA BESTO ! — Homa celo : Vivi, morti laŭ anĝelo.



ENIGMO-KONKURSO

N-ro 15

LABIRINT-ENIGMO.

La vortoj komenciĝas kaj finiĝas ĉe dikala linio. La litero « r » inter krampoj (r) signifas ke oni devas preni nur la radikon de la koncerna vorto. Jen la signifo de la serĉotaj vortoj :

Horizontale (de maldekstre dekstren) : a 1. Prepozicio tempa kaj loka ; a 6. demandvorto tempa ; b 2. demandvorto loka ; b 6. estinta (prefikso) ; c 3. lumigilo ; d 1. sufikso (instrumento) ; d 3. prepozicio ; d 8. sufikso (amaso) ; e 2. malgranda ; e 6. kaptilo (r) ; f 1. sufikso similŝanca kiel « fari » ; f 3. malobeo, kontraŭstaro (r) ; f 8. sufikso montranta kolektivecon ; g 3. parenco ; h 2. persona pronomo ; h 6. valora metalo ; i 1. moviĝo de akvo ; i 6. korpoparto.

Vertikale (de supre malsupren) :

1 a. Movado persekutita de la Naziismo ; 2 b. supera lernejo ; 3 c. mezuro por likvaĵoj ; 4 a. trinkaĵo (r) ; 4 h. ne nenio ; 5 a. ne iu alia ; 5 d. longa, cilindroforma ilo (r) ; 5 g. monujo (r) ; 6 a. konjunkcio ; 6 h. partiga sufikso ; 7 c. korpoparto ; 8 b. uĵeto por konservi aŭ forsendi ion ; 9 a. ĉefurbo.

Ni petas pardonon de niaj enigmo-solvantoj, ke malgraŭ nia promeso ni ne povis publikigi novan konkurson jam en la pasinta numero ; dum la vintraj monatoj ni esperas trovi lokon, por ĉiumonate publikigi almenaŭ unu enigmo-konkurson.

Solvoj de la hodiaŭa enigmo (sur aparta papero aŭ poŝtkarto) atingu nin ĝis la 10-a de januaro 1948, sub la adreso : Heroldo de Esperanto, Scheveningen, Nederlando.

Por la ĝusta solvo ni fiksis la jenajn premiojn :

- 1. Degenkamp : Esperanto 60-jara.
- 2. Setälä : Esperanta Legolibro, bd.
- 3. Pensoj de Zamenhof.
- 4. Gresset : Ver-vert.
- 5. Fock : El « Navigado estas necesa ».

SOLVO

de la Enigmo-Konkurso N-ro 14. SILAB-ENIGMO.

- 1. Elefanto ; 2. ĉkani ; 3. gliptodonto ; 4. universitato ; 5. teritorio ; 6. onobriko ; 7. miriapodoj ; 8. alfabeto ; 9. leukocito ; 10. gastronomo ; 11. reŭmatismo ; 12. ambasadoro ; 13. nihilismo ; 14. deklaro ; 15. argumento ; 16. kontoro ; 17. ordinara ; 18. nepotismo ; 19. saksofono ; 20. tarentelo ; 21. antagonisto ; 22. numeratoro ; 23. trobadoro ; 24. armeno ; 25. frugilego ; 26. recitativo ; 27. anomalia ; 28. parenco. — La vortoj Zamenhofaj :

Eĉ guto malgranda, konstante frapante, Traboras la monton granitan.

Alvenis 52 solvoj el 16 landoj, ĉiuj korektaj rilate al la finsolvo (la vortoj Zamenhofaj) ; sed nur 44 solvoj el 15 landoj estis korektaj ankaŭ rilate al la 28 vortoj supre cititaj. La gepremiitoj estas :

- 1. F-ino Anna Loft, Vejle, Danlando.
- 2. J. IJben, Hengelo, Nederlando.
- 3. Chr. F. W. Slijper, Utrecht, Nederlando.
- 4. D-ro W. Lippmann, New York, Usono.
- 5. A. Baiksa, Budapest, Hungarujo.

Se vi posedus du bovinojn ...

Nia samideano *Frank L. Gaines* sendis al ni la sekvantajn « praktikajn klarigojn » pri kelkaj -ismoj, kiujn ni ne volas kaŝi al niaj legantoj.

Socialismo : Se vi posedus du bovinojn, vi donus unu al via najbaro.

Komunismo : Se vi posedus du bovinojn, vi donus ilin al la registaro, kaj la registaro vendus al vi la lakton.

Faŝismo : Se vi posedus du bovinojn, vi retenus la bovinojn kaj donus la lakton al la registaro, kiu vendus ĝin al vi.

Naziismo : Se vi posedus du bovinojn, la registaro mortpafus vin kaj prenis la bovinojn.

Kapitalismo : Se vi posedus du bovinojn, vi vendus unu kaj aĉetus virbovon. (Tio estas, se vi estus bonŝanca ; sed se vi estus malbonŝanca, via kreditoro devigus vin vendi ambaŭ bovinojn, kaj vin mem vi pendigus. — Red.)

RIDO SANIGAS.

ILI VOLIS PERSONE SALUTI LA MAJSTRON.

La majstro iam vizitis novan Esperanto-grupon en malgranda urbeto. Ĉe la stacidomo li estis akceptata per orkestro, kiu ludis la « Esperon ». Kiam la majstro demandis, kial oni tiel honoras lin, la orkestrestro, kiu montrigis esti la prezidanto de la grupo, respondis : « Tial, kara majstro, ĉar niaj grupanoj volis *per-sone* saluti vin ! »

LA VIRINOJ.

Edzo, vizitanta kun sia edzino ĉapelbutikon : « Jen plaĉa ĉapelo, prenu ĝin ! » Edzino : « Tian ĉapelon neniu plu surhavas ! »

Edzo : « Nu do, prenu ĉi tiun alian ! » Edzino : « Tian ĉiu virino surhavas. »

J. Kohen-Cedek :

Tra tri kontinentoj

Ĉe Afrika bordo.

Strangan vojon elektis mia ŝipo : de aziaj bordoj al Eŭropo ĝi gvidas min preter Afriko. Mia unua survoja haveno devas esti *Iskandrio*.

— Iskandrio ? certe demandos la leganto, — kie ĝi situas ?

— Ĉu vi ne scias ? Ja tia estas la nuna nomo de la famekonata *Aleksandrio*. Jes, jes : Aleksandrio — fondita de Aleksandro Macedona, apud la maldekstra brako de Nila delto. Aleksandrio — la urbo de diaĉohaj Ptolemeidoj kaj epigonaj Laĝidoj, la kosmopolita centro de l' unua universala civilizacio ; la helenista, kun la unua, dum la mondhistorio, nacia sed tamen *interpopolita lingvo* : la antikva greka.

Aleksandrio — la centro de klasik-epokaj scienco, filozofio kaj artoj, la potenco — dum sia florperiodo — ĉefurbo de la tuta kultura mondo. La urbo de Eratosteneno, Aristarko kaj la Septuagintanoj, la urbo de virta Filono kaj de malica Apiono, la prapatro de « scienca » judofobio. Aleksandrio — la urbo de Antonio kaj Kleopatro ..., ho, kiom da rememoroj elvokas ĉi tiu urbonomo !

Iru ni do vidi, kio restis de la Muz'ejo (Templo de Muzoj), kiun konstruis Ptolemeo Sotero, kun ĝiaj prelegsalonegoj, gimnastikhaloj, teatro kaj observatorio. Vidu ni, kio restis de lia « Biblioteko » — la unika librarejo en la mondo, kun miliono da papirusoj kaj ledaj skribulaĵoj. Kion el siaj majstropentraĵoj postlasis

al ni la granda Apelles ? Iru ni vidi, kion la tempo konservis de la kolosa Farosa lumcitadelo, konstruita el lakto-blanka malgrandazia marmoro. Vizitu ni la Somo'n, la tombomonumenton de Aleksandro la Granda kaj la grandiozan Serapion'on, la templon de en-Ozirison-metamorfoze-eniĝinta animo de l' sankta Apis-bovo. Iru ni !

— Kion vi diras ? ... Ĉu vere nenio postrestis ? Eĉ postsignoj ? Nek la Muzejo nek la Biblioteko ? ... Ho, fatalon-portanta, plejpotenca Ananko, filino de Tartara nokto !

Nenio ... kia terura vorto ! Anstataŭ Farosa citadelo — tute moderna, negranda lumturo kun elektra projekciilo. Anstataŭ Serapiono — borsdomo en maŭritana stilo. Anstataŭ muzikpalaco de Aŭletes — itala opero, kaj anstataŭ « Hairete ! », la mildsona salutbeno de l' antikvaj helenoj, oni aŭdas nur la raŭkvoĉan, severan : « Bakŝis ! », la plej kutiman vorton en la tuta Mezoriento ...

Forpasis poreterne la memama, voluptema sed aspektoriĉa kaj artplena helenisma mondo. Postsekvigis ĝin al Leto la mondo latina, bizantia ; venis Fatimidoj, poste Mamelukoj ... Ĉiujn ilin heredis regno establita de albana tabakvendisto Muhamad-Ali, la kreinto de l' nuna egipta ŝtato kaj fondinto de ĝia nun reganta dinastio.

Multaj popoloj agis sur la flava-sabla tereno de Nila delto, agis kaj forpasis. Kulturoj floris kaj senpostsigne malaperis. Restis sole la praaj piramidoj, la hieroglifitaj kolonoj de plej antikvaj temploj kaj la ne-enpenetrebla, por pens-deĉifrado, muta vizaĝo de l' dezerta Sfinkso.

Revenuloj mezuras la dimensiojn

Ni recenzas.

Dony nivelon al viaj kunvenoj!

La antikva Grekujo — Inter la araboj kaj Arabio — Siamo. Jen la titoloj de la unuaj filmstriaĵaj prelegoj, kies tekstlibroj jam aperis en Esperanto. Certe multaj grupoj kaj kluboj volonte profitos de tiu okazo, prezenti al siaj membroj kaj invititaj gastoj interesajn prelegojn, ilustritajn per lum-bildoj laŭ ĉi tiuj filmstriaĵoj. La prezo de la filmstriaĵoj kun la tekstlibroj estas: N-ro 1. La antikva Grekujo (58 filmbildoj) gld. 6.85 aŭ 35 resp.-kup.; n-ro 2. Inter la araboj kaj Arabio (39 bildoj) gld. 5.25 aŭ 27 resp.-kup.; n-ro 3. Siamo, lando kaj popolo (54 bildoj) gld. 6.25 aŭ 32 resp.-kup. Filmstriaĵoj sen tekstlibroj ne estas acetablaj; tekstlibroj solaj kostas po gld. 3.50. Eldonis: Esperanto-Film-Grupo, Antwerpsestraat, 45, Bergen op Zoom, Nederlando. Mendojn peras la Libroservo de Heroldo.

La filmoj estas bonegaj, tre instruaj, kaj kapablaj krei nivelon, kian ĝis nun oni ofte vane klopodis atingi en la grupkunvenoj. La eldono de la unuaj tekstlibroj en Esperanto okazis iom rapide, tial ilia lingvaĵo ne estas senerara. Sed tio neniel bezonas influi la uzeblecon de la prelegoj. La tekstlibroj ja estas nur gvidiloj por la preleganto, kaj li povas laŭ sia plaĉo aŭ laŭ la bezono pliampleksigi aŭ plikoncizigi, kaj samtempe korekti, la tekston. Cetere la eldonintoj jam mem aldonis liston de korektoj.

T. J.

Tutmonda Adresaro de la Esperantistoj, 1947. — 130 p., 16 x 21 cm. Sub la aŭspicioj de Int. Esp. Muzeo en Wien, Hofburg, Reichskanzleitrakt. Prezo 13 resp.-kup. Mendebla (sed ne tuj ekspedebla) ĉe la Libroservo de Heroldo por gld. 2.60 aŭ 13 resp.-kup.

La kompilo de adresaro estas temporaba laboro, precipe se ĝi estu iom fidinda. Krome, la eldono de tia libro en la nunaj cirkonstancoj estas tre malfacila. Tamen s-ro Steiner ĝin riskis. La libro enhavas preskaŭ 8000 adresojn el 3000 lokoj en 80 landoj. Granda kvanto; sed mi esperas ke ĝi ne reprezentas, laŭ la titolo, la esperantistojn, t.e. ĉiujn esperantistojn. Eĉ la nombro de l' organizitaj esperantistoj estas oble tiom. Multaj adresoj, almenaŭ inter la nederlandaj, estas kripligitaj; pri tio verŝajne kulpas neklara skribo. Restas la fakto, ke la Jarlibro de UEA, kvankam ĝi enhavas malpli da adresoj, estas nia plej fidinda adresaro. Tamen mi supozas ke la adresaro de s-ro Steiner trovas multajn interesulojn.

J. v. R.

Versaĵoj de JoE. 55 p., 10 x 16 cm. Multoblita. Eldono: Presejo de «Sukro», 2 Cambridge St., Willoughby, N.S.W., Aŭstralio.

Iom skeptike mi komencis legi ĉi tiun kolekton da versaĵoj, kiun la aŭtoro eldonis je nur 200 ekzempleroj, kredeble ne vendotaj sed senditaj al amikoj kaj redakcioj. Nu, mi surprizigis: Kvankam la versaĵoj ne estas majstropemoj, ili tamen agrable legiĝas. Jen naivaj, jen spritaj, jen frivolaj, ili kune formas volumeton kiu ne enigas. Kelkaj estas simple belaj, ekz. «Se povus mi pluvigi goĵon sur cin», aŭ: «Kun orel' sur mia sino». La aŭtoro erare skribas «spruci» por «ŝpruci»; sed tiun eraron oni trovas ne nur ĉi tie.

M.

Esperanto simpligita (Esperanto simplifita). 4-paĝa pamfleto en lingvoj Esperanto kaj angla, eldonita de Rev. John Kubacki, 3114 So. 14th Street, Milwaukee 7, Wis., Usono. — Ke la supersignitaj literoj kaŭzas certajn malfacilaĵojn ĉe la presado de Esperanto-tekstoj, estas fakto. Sed ili ne estas tiaj, ke ili pravigas konkludojn kiajn faras Rev. Kubacki en sia pamfleto. Kaj tute certe ne estas «ĉio en butero», se oni nur forigus la supersignojn. Cetere, la proponoj de s-ro K. por anstataŭigi la supersignojn ne estas la plej sagacaj, kaj sendube estus trovebla solvo pli akceptebla, se nur de tiu solvo dependus la estonteco de nia afero. Versajne, post nelonge, ni havos okazon reveni al ĉi tiu temo.

T. J.

Novaj Esperanto-gazetoj.

BRAZILIO.

Rio Esperantista, of. organo de Asocio Esp. Rio de Janeiro. N-ro 1, aprilo 1947. — 6-paĝa, presita. — Adreso: R. das Marrecas, 19. 2. andar, Rio de Janeiro, Brazilo.

Nova Sento. 8-paĝa presita organo de Uberlândia Esperanta Klubo, Caixa Postal 337, Uberlândia, Est. Minas Gerais, Brazilo. N-ro 1, majo 1947.

Montara Bulteno, organo de Esp.-klubo «Azeredo Coutinho», poŝtkesto 801, Belo Horizonte (M.G.), Brazilo. N-ro 1, 1946-1947, 12-paĝa, multoblita.

S. Paulo Esperantista. Organo de S. Paulo Esperanta Klubo, Caixa Postal 5888, S. Paulo, Brazilo. N-ro 1, aprilo, 8 presitaj paĝoj.

Krome aperis la sekvantaj, plejparte nur multobligitaj: Bahaaĵ Informoj; FLE-Amiko; Int. Esperanto-Servo de Aŭstrio; Interstena Ligileto; Juko; Journalisto; La Esperantista Laboristo (kun: Le Travailleur Esperantiste); La Ponteto; La Tventita Bulteno; Meteoro; New Zealand Esperantist; Renkonten al vivo; TEA-Bulteno; TEJA-Informilo; Vegetara Revuo. Se la loko permesos, ni publikigos la detalajn adresojn en iu el la sekvantaj numeroj.

Esperanto en la gazeto.

Peace News, London, 4.7. Kun traduko de art. pri letero de Mathilde Rathenau el Heroldo de 1.6.

Catholic Digest, St. Paul, Minn., Usono, julio. Grava katolika revuo kun 3-paĝa artikolo de Marcus van Steen «Resolving Babel».

The Pittsburgh Courier, Pittsburgh, 31.5. Kun bildo de Esp.-studintoj, inter ili kelkaj genegroj.

Liechtensteiner Volksblatt, Vaduz, 12. kaj 15.7. Art. «60 Jahre Esperanto».

Wanderer, turisma revuo, Graz, Aŭstrio, n-ro 4-5: Kelkaj Esp.-sciigoj; n-ro 6-7: Komenco de Esp.-kurso.

Aftenposten, plej granda tagjurnalo norvega, 14.7. Ampleksa artikolo pri Esp. kiel neŭtrala paclingvo, de C. Stöp-Bowitz.

Skaraborgaren kaj *Skaraborgs-Tidningen*, Skövde, Sved., 4.7. Ambaŭ ĵurnaloj enhavas artikolon pri vojaĝo de svedaj esperantistoj al Bern, la dua ankaŭ pri vojaĝo al Ipswich.

Reformatus Elet, Szatmarnemeti, 8.6. En tiu revuo regulajn pri-Esp. artikoletojn prizorgas J. Csapo.

En *Dordrechtse Nieuwsblad*, *Rotterdamse Nieuwsblad*, *Bredasche Courant* kaj *Goudsche Courant*, nederlandaj ĵurnaloj, aperas dusemajna Esp.-rubriko, redaktata de «La Kvar Delegitoj».

Esperanta Radio-Kalendaro.

Ankoraŭ validas la Radio-Kalendaro publikigita en n-ro 16 (1075). Nur ŝanĝo pri Wien: okazas dissendoj mardo je 17.20-17.30 por ondoj 31,41 kaj 228,6 m. (esperantlingvaj informoj), kaj ĵaŭde je 5.33-5.45 per ondo 50,68 m. (germanlingve pri Esperanto). La horo estas laŭ normala Greenwich-Tempo. Centreŭropanoj kaj nederlandanoj aldonu unu horon. Merkredo ne plu okazas dissendo el Wien. — Krome la ĉiutagaj mallongondaj elsendoj el Praha okazas nun per ondo 31,41 (anstataŭ 25,34) kaj 49,92 (anstataŭ 31,41); la sendtempoj restis.

La 19.9 disaŭdigis ĉiuj polaj radiostacioj la raporton pri la 32-a U.K. en Bern, prilaboritan de la delegito al la kongreso, s-ano Dratwer.

La programo de la Hungara Radio anoncis por la 14.9. antaŭtagmeza koncerton de violon-kvarteto «Esperanto». Ĝi estas nova titolo de violon-artistoj sub gvido de konata esperantisto Biro. Espereble ĝi pli ofte koncertos ĉiam sub tiu nomo en diversaj urboj. — En Budapeŝta Radio komence de aŭgusto estis hungarlingva parolado pri internaciaj lingvoj. La 15.9 okazis interparolo inter la redaktoro de la radio, s-ro J. Szitnyai, kaj la partoprenintoj de la Berna kongreso.

ANONCETOJ

Naskiĝo Régulo Rodriguez. Al s-ano J. Régulo Pérez, Cabrera Pinto 30, La Laguna (Tenerife), Kanariaj Insuloj, kaj ties edzino s-ino Carmen Rodriguez Hernandez naskiĝis ilia unua infano, filino nomita Maria. — Ni kore gratulas.

Naskiĝo Walder. La 6.10. naskiĝis Ruth Alice, filino de ges-anoj Otto Walder-Guggenbühl en Romanshorn, Svislando. — Kora gratulon!

Naskiĝo Veldhuyzen. Al ges-anoj Ed. J. Veldhuyzen-Bonnixsen, Hof van Delftlaan 79, Delft, Nederlando, naskiĝis la 5.11. filo nomita Niels Harald. — Ni kore gratulas.

Edziĝo Saponjić-Klajić. La 27.7. geedziĝis en Beograd, Jugoslavio, s-ano Momčilo V. Saponjić, sekr. de Serbia Esp. Ligo, kun esperantistino Jelena Klajić, filino de konata jugoslava esperantisto Radomir P. Klajić, hon. membro de UEA kaj de Serbia Esp. Ligo. — Ni kore gratulas.

Letervesperon por propagandi Esperanton inter novaj grupoj aranĝos nia klubo, meze de marto 1948. Gesamideanoj skribu multnombre, ilustritajn poŝtkartojn kaj leterojn. Certe respondos. S-ino Anna Kincaid, korespondanta sekretario, 7034, N. Charleston Ave., Portland 3 (Oregon), Usono. (44)

Letervespero. Esperanto-Societo Kunlaboro aranĝos letervesperon en la fino de decembro. Ni reciproke respondos. Adreso: Esperanto-Societo Kunlaboro, Simolantie 6, Lappeenranta, Finnlando.

Helpu serĉi Rud. Stuchly, nask. 1917 en Ostrava-Zabreh, Csl., kiu foriris 1939 Polujon, poste Francion, kie li soldatservis ĉe franca legio kiel eksterlandano. Estis militkaptita de germanoj. Forkurinte li skribis lastan leteron el suda Francio en marto 1941. Uzadis ankaŭ pseŭdonimon Jan Brogi. Kiu pri li ion scias, bv. skribi al: Cs. radiostacio Ostrava, Ĉeĥoslovakio.

Kiu volas helpi? Serĉas neeldonitan temon psikologian kaj superrealistan por verki romanon s-ano Daniel Carion, 12 rue Racine, La Courneuve (Seine), Francujo. Li respondas ĉiujn lingvajn demandojn.

S. A. Manolov, 9 ul. Dr. Cankov, Sliven, Bulgario, deziras interŝanĝi 25-60 belbildajn poŝtkartojn aŭ kelkajn novajn seriojn kun ĉiuj landoj.

Por ekspozicio! Sendu al ni ilustr. poŝtkartojn, leterojn, gazetojn, librojn kaj propagandilojn, por ke nia verda familio pli grandigu per kelkcent novaj geanoj! Af-ranku bele filatele. Por dudek plej bele afrankitaj sendaĵoj speciale bela respondo. Adreso: «Esperanto-Kursoj», Camp Mutzelburg, (24b) Flensburg-Mürwik, Germanujo.

Ĉeĥoslovaka esperantistino, 36-jara vidvino, 167 cm alta, tre bela, nigrahara, deziras korespondi pri edziĝo kun fraŭloj aŭ vidvoj, ankaŭ eksterlandaj. Foto interŝanĝota. Certe respondo. Leterojn peras Esperanto-Asocio en CSR, Uralské 9, Praha XIX, Ĉeĥoslovakio.

Esperantista Klubo, Zamenhofova 1010, Hradec Kralové II, Ĉeĥoslovakio, bezonas por siaj preskaŭ 70 novaj gesamideanoj korespondantojn. Respondon ricevos ĉiu skribinto.

S-ro Leburgue Jules, 66 rue J. B. Delescluse, Croix (Nord), Francujo, deziras korespondi letere aŭ il.-poŝtkarte kun gesamideanoj en eksterlando, precipe Brazilo, Danujo, Finnlando, Usono. Ĉiam respondos.

Mi interŝanĝas nur neuzitajn poŝtkartojn kun ĉiuj landoj. Ĉiam respondos. S-ro Champonnois, 10 rue de l'Abbé-Grégoire, Issy-les-Moulineaux (Seine), Francujo.

LIBROSERVOJ! ACETINTOJ!

Temas pri LA LONGA VOJO.

En parto de la laste binditaj ekzempleroj de «La longa vojo» la bindisto forgesis kunbindi la paĝojn 133-136. Kiu posedas tian ekzempleron, bonvolu komuniki al ni sian adreson kaj indiki, ki li aketis la libron. Tiam ni sendos la mankantajn paĝojn jam tranĉitajn je la ĝusta mezuro, por ke vi povu englui ilin.

LIBRO-FAKO DE HEROLDO.

Libroj el nia propra eldonejo aŭ deponejo

Adolf: <i>Decismo</i> . Politika broŝuro	0.45
Albanio	0.15
Baghy: <i>Printempo en la aŭtuno</i> . Rakonto	1.20
Barker: <i>La lingvo de la bestoj</i>	0.15
Blicher (Bulthuis): <i>Taglibro de vilaĝpedelo</i> . Rakonto	0.30
10 ekzempleroj por grupoj	2.10
<i>Bukedo I</i> . Rakontoj de diversnaciaj aŭtoroj	0.30
<i>Bukedo II</i> . Rakontoj de diversnaciaj aŭtoroj	0.30
Bulthuis: <i>Malriĉa en la spirito</i> . Drameto	0.30
Elola (Berenguer): <i>La amo en la jaro dekmil</i> . Romano, bindita	3.30
* Fock (Jarszewski): <i>Navigado estas necesa</i> . Rakontoj	0.30
Forst de Battaglia (Jung): <i>La mistero de V sango</i> (popolsciencia verko, riĉe ilustrita), bindita	2.10
Haefker: <i>Jarmiloj pasas</i> . Originala mondhistorio, bindita	9.—
Herceg: <i>Pangea</i> . Politika broŝuro	0.15
Hesse: <i>Sonoj novaj kaj malnovaj</i> . Versaĵoj	0.15
Hohlov: <i>La tajdo</i> . Lirikaĵa versaĵoj	0.60
* Isaac (Morariu): Sonorilo kaj kanono	0.60
Jung: <i>Ek al bataŭ!</i> Esperantistaj versaĵoj	0.15
Jung: <i>Landoj de Fantazio</i> . Originala romano	3.—
La sama, bindita	4.80
Kilian: <i>La mondono al ni!</i> Vojaĝaventuroj	1.05
Kitzler: <i>Internacia gramatiko de Esperanto</i> , kartonita	1.50
Kloepffer (Goppel): <i>Vagabondo kaj sinjorino</i> . Romano, bindita	3.—
<i>La Maro</i> . Rakontoj, bindita	2.25
<i>La Multekolora Libro</i> . Varia legaĵo	1.35
Maxwell (Sampson): <i>Anstataŭa edzino</i> . Romano, bindita	3.—

Meye: <i>La longa vojo</i> . Originala romano	1.80
La sama, bindita	2.40
Minor: <i>Pro Dio, ne esperantiston!</i> Unuaktaĵo	0.30
<i>Mozaiko</i> . Varia legaĵo	0.30
10 ekzempleroj por grupoj	2.10
* <i>Oriento</i> . Orientaj literaturaĵoj, bindita	2.40
Osmond: <i>Kiki I kaj II, kune</i>	0.45
10 ekz. I kaj II por grupoj	3.—
<i>Patroj</i> . El antikva hebrea literaturo	0.30
Robinson: <i>Se grenereto</i> . Originalaj rakontoj	1.05
La sama, bindita	1.50
<i>Rübezahl</i> -rakontoj por infanoj	0.30
10 ekzempleroj por grupoj	2.10
ŝalom Aleĥjem: <i>Ĉe doktoro</i>	0.15
Scott: Filatela terminaro	0.45
Storm (Heitmüller): <i>Du majstronoveloj</i> . Bindita	2.10
<i>Sub la signo de V Espero</i> . Rakontoj el la esperantista vivo	0.30
Toller (Wolff): <i>La hirundlibro</i> , bindita	2.10
Tolstoj (Hohlov): <i>La morto de Danton</i> . Tragedio	0.60
Trögel (Schröder): <i>Esperanto kaj kulturo</i>	0.30
Vink: <i>Esperanta kantokolekto</i> , ilustr.	0.45
Wingen: <i>Kiel aranĝi kursojn kaj grupvesperojn?</i>	0.30
Zweig (Wolff): <i>La okuloj de la eterna frato</i>	1.20

* Steleto signifas ke la koncerna verko estas elĉerpiganta.

La prezoj estas en guldenoj. Por sendkostoj aldonu 10%, minimume gld. 0.10. Ĉe mendo por minimume 10.— guldenoj (Nederlanda 5.— gld.) ni liveras, ne kalkulante sendkostojn. Ekster Nederlando estas rekomendinde mendi niajn librojn ĉe sialanda Esperanto-libroservo.

Libro-Servo de HEROLDO DE ESPERANTO, Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Nederlando

Literatura Mondo, nia sola literatura revuo, sub redaktado kaj kunlaborado de niaj plej eminentaj verkistoj, kostas por 1948 gld. 7.20, bfk. 125.— aŭ egalvaloron. Jam nun mendo ĉe la administracio de Heroldo de Esperanto, Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Nederlando.

Internacia Kulturo. Ankaŭ por 1948 ni akceptas abonojn al tiu altnivela, riĉe ilustrita, maldekratendeca revuo. Por nederlandanoj gld. 5.50; por belgoj fk. 100.— Heroldo de Esperanto, Scheveningen, Nederlando.

Amatora magiisto deziras korespondi kun gesamideanoj en la tuta mondo pri ĉiaj temoj. Bonvolu sendi al mi ilustritajn poŝtkartojn kaj interesajn leterojn, eventuale gazeton de via Esperanto-klubo. Mi absolute respondos al ĉiuj, kiuj skribos saluton al mi. Skribu tuj al: S-ro Axel Hattens Gudmandsen, Dannebrogsgade 52 A.St., København V., Danujo. (37)

Esperantistoj! Aĉetu viajn plantojn, florbulbojn kaj arbustojn ĉe s-ano H. de Water, Vijzelstraat 203, Scheveningen, Nederlando. Petu ilustritan prospekton! (38)

Instruistoj, ĝejnuloj! Mi bezonas por nacilingve eldonota libro originalajn fabelojn kaj rakontojn el via nacia lingvo. Jozefo Tichy, Ludové nam. 1, Bratislava, Ĉeĥoslovakio. (40)

Ne-katolikoj, kiuj deziras informojn pri la katolika religio, povas ricevi ilin senpaga de la Internacia Katolika Informejo, Loozopzand, Nederlando. (45)

Mankas al mi la jenaj Heroldo-numeroj: 301 (1925), 419 kaj 420 (1927), 444 (1927) kaj 563 (1930). Kiu povas liveri ilin por kompletigi miajn jarkolektojn? Proponojn petas D-ro Paul Neergaard, Gothersgade 158, København K., Danlando.

Nederlando, s-ro A. G. Hoekma, Laan van Eik en Duinen 20, Den Haag, deziras korespondi poŝtkarte aŭ letere kun ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj, prefere pri astrologio, esoterismo kaj religiaj problemoj. Certe respondos.

S-ro Harry Sørensen, Ingstrup, Danlando, deziras multe da poŝtkarto de via lando. Mi sendos samkvante kaj samvalore da danaj poŝtkartoj. Bonvolu afranki filatele Certe respondos.

S-ino Jeanne Magaud, 5 rue Guillotte, Villeurbanne (Rhône), Francujo, 48-jara, deziras sinceran amikilon svedan, danan aŭ svisan. Interŝanĝas poŝtkartojn kun ĉiuj landoj.

Interŝanĝas poŝtkartojn, prefere neuzitajn, en kompletaj serioj laŭ Yvert aŭ alia ajn konsento. R. Chance, 3 Rue René Bourgeois, Reims, Francujo.

Deziras aĉeti ekzempleron de unuaj Esperantaj lernolibroj eldonitaj de D-ro Zamenhof en 1887; pagos malavare. Charles Chomette, 8525 Saturn St., Los Angeles 35, Calif., Usono. (39)

Ukraina Skolta Esperanto-Grupo, Ukr. Camp 709, (14a) Ellwangen-Jagst, US-zono, Germanujo, deziras korespondi kun ĉiuj, precipe kun tutmonda skoltaro.

Brazilo. F-ino Y. Costa, R. Cosme Velho 104 c/vi, Laranjeiras, Rio de Janeiro, Brazilo, ŝatus korespondi kun gesamideanoj ĉiulandaj, per leteroj kaj ilustr. poŝtkartoj; prefere intelekt. filoz. Esp.-temoj.

Kontraŭ 25 aŭ 50 poŝtkartoj de via lando, mi sendas egalan kvanton da francaj poŝtkartoj. Garantata respondo. S-ro H. Croizé, 5 Place du Commerce, Paris 15, Francujo.

Kontraŭ bele filatele afrankitaj poŝtkartoj kaj kovertoj mi nepre sammaniere respondos. S-ro Roman Chambaz, 44 Rue du Haut-Pavé, Etampes, S. et O., Francujo.

Voldemaro Rosentals, Latvian D. P. Camp, Infanterie-Kaserne 5-9, (13a) Würzburg, Germanujo, serĉas gesamideanojn, kiuj povus helpi al li, kun siaj edzino kaj 11-jara filo forveturi el Eŭropo. Mi deziras ankoraŭ vivi en nova patrujo, mi akceptos ĉian laboron.

Dana instruistino deziras poŝtkartojn, fotojn kaj bildlibrojn el ĉiuj landoj por uzi ĉe instruado. Interŝanĝe mi sendos poŝtkartojn kaj bildlibrojn el Danlando. Ellen Jensen Skotting, Gjøringsvej 16 St., Hellerup, Danlando.

21-jara studento deziras korespondi letere kaj bildkarte. Certe respondos. Adreso: Lorenz Bartek, Schuhmeierplatz 5/8, Wien 16, Aŭstrio.

Kiu povos helpi forpelitojn el Danzig, kiuj ĉion perdis kaj fariĝis pli mizeraj ol almozpetantoj? Adreso: Franz Mattern, (20b) Heimssen 140 ŭb. Holzminden, brita zono, Germanujo.

En ĉiuj anguletoj de la tero ni serĉas kunlaborantajn-konsulojn por disvastigi novan eldonaĵon. Profito 10%. Skribu tuj! Af-ranku bele filateliste. Ne forgesu respondoponon. Johano Dags, Mutzelburg, (24) Flensburg, Germanujo.

Averto! Karaj gesamideanoj, sendu viajn poŝtaĵojn nur al mia poŝtadreso, por ke ili ne perdiĝu! Henk Valckenier, van Speykstr. 138, Hago, Nederlando.

ABONU LA REVUON
Rio Esperantista

Caixa Postal 3677 - Rio de Janeiro
(Brazilo)

Direktas: Nelson de Souza
Redaktas: Laszlo Zinner

J a r a b o n o : 25 respondkuponoj
Proveksemplero kontraŭ 1 resp.-kup